

N I A V O Ĉ O
Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4^oB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

JANUARO 2008

En aparta folio ni inkludas, por nia membraro, la memoron kaj la kontojn de 2007

ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La Prezidantino de Madrida Esperanto Liceo kunvokas vin ĉeesti tiun kunvenon, kiu okazos lastan lundon de Januaro (28an) je la 18.30 en unua kunvoko kaj je la 19.00 en dua, en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7, sub la sekva tagordo:

- 1.- Informo pri membraro
- 2.- Legado kaj eventuala aprobo de la antaŭa protokolo (Vidu "Nia Voĉo" 2007-02)
- 3.- Detala raporto pri MEL-agado dum la jaro 2007 (Vidu "Nia Voĉo" 2007-12)
- 4.- Prezento de programo realigebla por la jaro 2008 ("Nia Voĉo" 2007-12)
- 5.- Konto-stato de MEL je la fino de 2007 (Kune kun "Nia Voĉo" 2008-01)
- 6.- Buĝeto por 2007 (Kune kun "Nia Voĉo" 2007-12)
- 7.- Sugestoj kaj demandoj

Cele al bonorda kaj pozitiva funkciado de nia organizo, la Estraro restos danka, se ĉiuj gemembroj akurate ĉeestos tiun Ĝeneralan Asembleon.

TRA LA MONDO

La pasintan someron kelkaj madridanoj: Félix Lobo, Matilde Montero, Silvia Gómez kaj Juan Trenado, partoprenis en la 20^a Junulara Semajno en Hungario. Félix instruis la hispanan al la scivolemaj esperantistoj

La 15-an de decembro Toño del Barrio denove organizis "Tagon de la Blogo en Esperanto". Li kontaktis kun la usonaj amikoj kiuj ĝin organizis pasintjare.

Dum la "Malferma Tago" (2007-11-25) en la Centra Oficejo de UEA, Jorge Camacho prelegis, deklamis kaj prezentis siajn librojn kaj Beletran Almanakon.

La n-ro 48 de la 16-paĝa, kolora revuo "Familia Esperanto", estas senkoste elŝutebla en la paĝo de "Rondo Familia": http://uea.org/rondo_familia/index.html
Ĝi okupiĝas pri hejma uzo de Esperanto, pri denaska edukado de Esperanto kaj pri aranĝoj por familioj.

En Madrido Pedro Hernández organizis bankedon por celebri la Zamenhofan tagon. Partoprenis 35 esperantistoj kaj simpatiantoj, inter ili kelkaj el siaj gelernantoj, S-ro Gerardo Flores, kiu kun 94 jaroj estas la plej maljuna madrida esperantisto, kelkaj membroj de la Iberia Grupo (Camacho kaj Miguel Fernández) kaj du membroj de la Estraro de HEF, Lupe Sanz, vicprezidantino, kaj Jorge Pavón, ĉefredaktoro de "Boletín".

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La peto al Ministerio pri Kulturo por la projekto "Lingvoj, trezoro de la homaro, ilo por dialogo" jam estas prezentita. La agado de Toño kaj Lupe nur estos

fruktodona unue se oni atingas oficialan monon kaj due se la hispanaj esperantistoj laboras en la diversaj punktoj de la projekto.

La enketo de Juan del Castillo por partopreni en la Librofoiro de Madrido, per budo, estis fiasko, ĉar li ne trovis sufiĉe da volontuloj. HEF serĉas alian eblecon por partopreni en la plej fama libro-foiro de Hispanio.

HEF SUBVENCIO 2007

La nura grupo kiu petis subvencion, dum 2007, al Hispana Esperanto-Federacio estis BARCELONA ESPERANTO-CENTRO. Por pagi al ĝi HEF nur atendas malgrandan memoron de la projekto (ekspozicioj) kaj fakturojn.

Hispana Kongreso 2008. Okazos en **Cuenca** inter la 3-a kaj la 6-a de julio. La aliĝilo estas disponebla antaŭ la fino de la jaro. Kotizo 30 eŭroj (25 por membroj de HEF). Banko de la Kongreso: Banco Santander Central Hispano, kontonumero 0049 4917 16 2696637046

TEJO: www.tejo.org

En 2006 Tutmonda Esperantista Junulara Organizo havis membrojn en 77 landoj, inter ili 22 hispanoj, 11 pli ol 2005. TEJO estas la junulara sekcio de UEA, kies celo estas popularigi internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de la internacia lingvo Esperanto. La organizo defendas kulturan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Nia konversacia rondo okazas ĉiuj lundoj ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7, Tel. 91 446 80 79. ĈIUJ ESTAS INVITITAJ.

28an de januaro je la 18,30: Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto Liceo.

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4ºB EXT

28005 Madrid